

LINGVO INTERNACIA

GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

ELDONATA JE LA NOMO DE L' KLUBO ESPERANTISTA EN UPSALA.

Kosto de abono por la jaro 1899:

Skandinavaĵ kronoj 2,00 = germanaĵ markoj 2,25 = frankoj 3,00 = rubloj 1,00 = portugalaĵ rejsoj 500 = brazilaĵ rejsoj 1000 = aŭstro-hungaraĵ kronoj 2,75 = cendoj 60 = ŝilingoj 2³/₁₂.

Pago por anoncoj:

15 oeroj = 15 pfenigoj = 20 centimoj = 8 kopekoj — por duonpaĝa petulinio. 10 % rabato por duonjaraĵ. 25 % rab. por tutaj anoncoj. Ĉe granda anoncado ankoraŭ pli da rabato laŭ reciproka konsento.

Adreso de l' redaktoro: *Paul Nylén, Upsala, Sverige* (Svedujo).

Adreso de la administrado: *Ekspedejo de Lingvo Internacia, Luleå, Sverige* (Svedujo).

Kun manuskriptoj kaj ĉio tuŝanta la tekston oni sin turnu al la redaktoro.

Pri abono, ekspedado, anoncoj kaj ĉiuj monaĵ aferoj oni devas turni sin al la Ekspedejo.

N:o 7 (43)

la 15:an de oktobro 1899

IV:a jaro.

Esperantista kalendaro.

Al la redakcio de l' gazeto "Lingvo Internacia".

Mi kuraĝas proponi al la amikoj de nia kara lingvo Esperanto la sekvantan kombinon, kaj opinias, ke ĝi en rapida tempo ne nur kovros tute la elspezitajn por ĝia efektivigo monaĵn rimedojn, sed donos ankoraŭ la sufiĉan profiton, kion en nuna tempo tiel tre forte bezonas la propagando de nia komuna kaj sankta ideo.

Mi rekomendas eldoni nun en lingvo esperanto malgrandan, poŝan, informan kaj memoran libron sub titolo: "*Akompananto de l' esperantisto en la 1900 jaro*".

Enhavon de tiu ĉi libro mi signis sekvantan: 1) *kalendaro de 1900 jaro*, 2) *festaj tagoj*, 3) *nomoj de la regnoj*, 4) *nomoj de la urboj pli gravaj*, 5) *reguloj poŝtaj kaj telegrafaj*, 6) *tabeloj de monosignoj kaj mezuroj*, 7) *183 puraj paĝoj de "ĉiutago"*, 8) *14 puraj paĝoj por adresoj*, 9) *4 puraj paĝoj por apartaj notoj*, 10) *internacia lingvo Esperanto kaj ĝia historio*, 11) *portreto de L. Zamenhof*, 12) *mallonga observo de la pasinta jaro pri la sukcesoj Esperantaj*, 13) *nomaro de esperantistaj kluboj, rondetoj kaj de iliaj ĉefaj membroj*, 14) *adresaro de la esperantistoj por 1899*, 15) *nomaro de eldonoj en la lingvo Esp.*, 16) *diversaj anoncoj*.

*

Mi unua konsentas oferi por tia libro *du (2) rublojn* kaj mi esperas, ke ĉiu el ni, al kiu estas kara la ekzistado kaj vastigado de la lingvo Esperanto, volonte oferos tiom do al la utilo de nia komuna kaj sankta ideo.

Kaj kompreneble, se tiu ĉi libro donos bonegan rezultaton, pri kio mi

ne dubas, estos eble, ke oni povos eldonadi similan memoran libron en la fino aŭ en la komenco de ĉiu jaro. En bona horo!

Kun koraj bondeziroj kaj salutoj

E. Radvan Rypinski,

abonanto de l' gaz. L. I.

u. Lodejnoje Pole. Rusujo 10/22 Sept. 1899.

Ni opinias, ke la projekto de s-ro Radvan Rypinski estas tre rekomendinda. La "Jarlibro 1897" eldonita de la societo "Espero" en S:t Peterburgo kaj redaktita de s-ro Borovko estis io en la sama speco, kian deziras s-ro R. Ĝia celo ne estis tamen rekte prezenti tian "akompananton", pri kiu parolas s-ro R., kaj tial ĝi ankaŭ ne estis presita en poŝa formato.

La nomoj de la naciaj almanakoj estas tre diversaj, kaj en tia libro ni ne povos enmeti la nomtagojn de ĉiu aparta nacio. Tial ni proponas, ke oni aranĝu tute esperantistan, internacian elekton de nomoj por nia almanako, enhavantan la plej uzatajn nomojn inter la esperantistoj el ĉiuj nacioj. Tiamaniere ni ankaŭ havos nomvortaron en nia lingvo. Oni povus ensendi al nia redakcio nomaron de la plej uzataj baptaĵaj nomoj viraj kaj virinaj en sia lando, kaj el tiu ĉi materialo la redaktanto de la dirita almanako povos elekti.

Se la redaktanto alligas al si subredaktantojn en la diversaj landoj, li certe havos tre ŝatindan materialon por tia libro. Kaj se oni varbas anoncantojn per prudenta maniero, la anonca pago enspezigos grandan parton de la presa kaj binda kosto.

Kompreneble tia libro devas havi belan eksterajn, bonan paperon kaj delikatan preson.

Ni kun plezuro donas nian voĉon por la propono de s-ro R.

La redakcio.



Novajoj.

El Orienta Sibirujo skribas al ni s-ro Polanskij:

En *Ĥabarovsk* sur Amur (Azio) en fino de la 1899 jaro komercisto Pijankov fondas libromagazenon, por kiu li mendas *ĉiujn* esperantajjn librojn. La vortaroj kaj lernolibroj havigos en granda nombro. Tio ĉi tre faciligos la propagandon de Esperanto ĉe ni, aparte se s-ro Pijankov efektivigos sian intencon fondi tielajn magazenojn en aliaj urboj de Primorska Apudmara kaj Amurska provincoj de Sibirujo.

En *Vladivostok* (la ĉefurbo de Primorska provinco de Sibirujo) de la 13:a de Julio 1899 estas fondita "*Instituto de l' orientaj lingvoj*". La studentoj, lernantaj la japanan lingvon, veturados Japanujon por plibonigi siajn koniĝojn kaj tiamaniere povus esti bonegaj apostoloj de Esperanto en tiu ĉi lando, se ili estus altiritaj al tiu ĉi afero. La aliĝo de Japanujo al la landoj kun Esperanta komuniko enportus ankoraŭ plian viviĝon en la esperantaj literaturon kaj korespondadon.

* * *

Vojaĝoj de Esperantistoj. En la komenco de septembro s-ro Valdemar Langlet ekvojaĝis al la interno de Azio por restadi tie por sciencaj esploroj.

Laŭ anonco en tiu ĉi numero la finlanda esperantisto s-ro T. Sunell en novembro veturos Rusujon por ellerni la rusan lingvon.

Sveda esperantisto s-ro K. G. Boman sciigis nin pri sia intenco viziti dum la venonta printempo Francujon kaj Belgujon.

* * *

"L' Œuvre Internationale", pariza ĉiumonata gazeto, kiu publikigas artikolojn en diversaj lingvoj, konsentas kelkajn akompani kun iliaj tradukoj Esperantaj, kondiĉe ke la tradukistoj estas samnacionoj, — sciigas al ni s-ro P. Berthelot. Li sendube volas diri, ke la tradukistoj estu samnacionoj kun la verkistoj. S-ro B. esperas, ke la redakcio de L. I. povos esti la intermano inter la redakcio de la dirita pariza gazeto kaj la tradukistoj. Tion ĉi ni promesis fari laŭ nia povo.

—>:⊗:←—

Gramatikaj konsideroj.

Sur la paĝo 14 de L. I. de la jaro 1898 s-ro P. Ahlberg metis demandon pri unu certa flanko de la fonetiko de la lingvo Esperanto. Neniu alia ĝis nun tuŝis tiun ĉi demandon, tial mi volas diri mian opinion pri la afero.

En ĉiu lingvo ekzistas multo da dialektaj sononuancoj, kaj ĉiu persono havas — se oni juĝas tre precize — sian apartan dialekton. Oficiala nacia lingvo estas nur ŝhemo, ja je certa grado neatingata kaj neatingebla idealo por la kleraj parolantoj. Ĝi estas la centro de la lingva sfero, kaj la dialektoj trovas sin pli malpli malproksime de tiu ĉi centro ĝis ekstreme al la periferio. Ankaŭ ĉiu aparta sono en ĉiu lingvo kaj eĉ en la tuta lingvaro havas sian centran kaj sian periferian elparolon.

La plej grava lingva elemento, rilate la elparolon, estas sendube la vokaloj. Ili distingiĝas per *sonoro* — kiamaniere ili sonas — kaj *daŭro* — kiadaŭre ili sonas.

La vokaloj de nia lingvo estas kvin: *i — e — a — o — u*. Ĉirkaŭ ĉiu el tiuj ĉi vokaloj kolektas sin en la nacia lingvaro grupoj da vokaloj kaj vokalnuancoj, kiel vasaloj ĉirkaŭ reĝo.

Komparante la sonojn de la vokala gamo de Esperanto kun la vokalaj sonoj de la naciaj lingvoj oni trovas, ke la vojo de unu esperanta vokalo ĝis alia iras tra serio da naciaj nuancoj, kiuj mankas en Esperanto. Dank' al la manko de tiuj "interaj" vokaloj, ĉiu vokalosono de Esperanto estas tiel akre apartigita, ke ĝi ne povas esti konfuzata kun alia.

Ni komparu iom da vokalosonoj.

En la lingvoj franca, itala kaj sveda, ekzemple, *i* estas tre pinte elparolata ne sole kiel longa sed ankaŭ kiel mallonga, en angla kaj germana, ekz., *i* mallonga estas elparolata per sono pli malfermita, proksima al franca *é*. La litero *e* reprezentas vicon da sonoj de la pinta, al *i* proksima, franca *é* ekz. en *préférer*, trans la centra *e*, ĝis la larĝa *ê*, ekz. en *bête*, aŭ la ankoraŭ pli larĝa *ä*, ekz. en la sveda vorto *karakter*, ankaŭ skribata *karaktär*, aŭ en *berg*, elparolata *bärrj*. Proksime al tiu ĉi plej larĝa sono *ê* staras la angla mallonga *a* ekz. en *lamp*, kaj la mallonga *a* ĉe la parizanoj tre proksimiĝas al la lasta; en la centro de la sonoj *a* estas sendube la itala *a* ekz. en *cara*, iom pli profunda estas la franca *â* kaj ankoraŭ pli profunda la sveda longa *a* ekz. en *par*, pli proksime al *o* staras la finna kaj hungara mallonga *a*; tiu ĉi allimas tre proksime al la angla sono *o* ekz. en *form* kaj la mallonga en *lot**);

*) Komparu la rusan elparolon de *o* en antaŭakcenta silabo kiel *a*.

ne tute tiel profunda estas la franca *o* en ekz. *or*; la centrala estas sendube la sveda *o* ekz. en *porter*; pli rondigita estas la franca sono *o* en *faute*, ankoraŭ pli la germana en *hoch*; en la skandinavaj lingvoj (dana, norvega kaj sveda) la litero *o* reprezentas ankaŭ sonon starantan tre proksime al *u*, ekz. la sveda vorto *dom* sonas preskaŭ simile al la germana *dumm*, tian saman sonon havas la finna *u* kaj *uu*; la centra sono *u* aperas ĉefe egalesona en la plejmulto da lingvoj: germana, rusa, itala k. c. *u*, franca *ou*, angla *oo*; la sveda *u* staras tre proksime al la *u* ekz. de la franca vorto *sur*, kies *u* — simila al germana *ü* — plej proksime respondas al la sveda *y*, kiu sonas tamen iom pli simile al *i*; ankoraŭ pli proksime al *i* staras la rusa malmola *i*.

Se ni metas kune la Esperantajn "centrajn" vokalojn kun iliaj "dekstraj" kaj "maldekstraj", ni ricevos serion, kiu revenas per la fino ree al sia komenco —

- i*: malmola (slava) *i*, ordinara *i*, malklara *ĭ*;
- e*: pinta *é*, ordinara *e*, larĝa *ê*;
- a*: angla *æ*, ordinara (itala) *a*, profunda *â*;
- o*: malfermita *o*, ordinara *o*, ronda *ô*;
- u*: skandinava *o* kaj finna *uu*, ordinara *u*, sveda *u*.

La bona elparolo de *i* estas tia, per kiu preskaŭ ĉiaj nacianoj elparolas "maŝino"; la plej bona *e* estas sendube tiu sono *e*, kiun uzas la plej multaj lingvoj, kiam ĝi aperas mallonga antaŭ konsonanto en akcenta silabo, t. e. tiel kiel ĝi estas elparolata en la vorto "seks"; modela *a* estas tiu ĉi itala sono tiel same elparolata kiel longa kaj mallonga en la itala vorto "parlare"; bona *o* estas tiel elparolata kiel la mallonga *o* de germana, sveda kaj itala; *u* estas la sono *u* de la plej multaj lingvoj, kvankam en kelkaj el ili ĝi havas diversajn signojn (en la franca: *ou*, en la angla: *oo*).

Tiuj ĉi kvin sonoj konservas esence saman nuancon se longaj kaj se mallongaj.

"Rilate la sondaŭro de ĉiu el tiuj ĉi kvin vokaloj, restu en la ĝusta mezo. Elparolu ilin ĉiujn kun daŭro egala kaj meza", diris s-ro L. de Beaufront en *l'Espérantiste*.

Por franco aŭ ruso tia regulo povas esti sufiĉa, pro la maniero de ilia nacia elparolo. Sed svedo, anglo, hungaro bezonas pli detalajn regulojn. Oni povus konsili, ke oni elparolu akcentatan vokalon (duone) longa, neakcentatan vokalon (duone) mallonga. La silabo kiu portas la akcenton, t. e. la antaŭlasta, ricevas nature pli karakteran elparolon ol la ceteraj kaj sekve certan longecon, kaj tiu ĉi pli longa sondaŭro estas aldividata al la vokalo kaj la sekvantaj en la sama silabo konsonantoj; se la silabo finiĝas per la vokalo, tiu ĉi, sekve, fariĝas pli longdaŭra ol alie.


Ekzemploj: *tri*, *stri-o*, *skri-bo*, *li-bro*, *vi-gla*, *mi-gri*, *ide-o*, *pe-ti*, *ke-glo*, *e-ble*, *bala-i*, *a-mo*, *tea-tro*, *a-kra*, *a-glo*, *a-kvo* (aŭ *ak-vo*), *afa-bla*, *ta-blo*, *hero-o*, *so-la*, *pro-pra*, *po-plo*, *ko-vri* (aŭ *kov-ri*), *blu-a*, *ru-ĝa*, *ku-ne*, *ku-dri*, *ku-glo*; *min*, *farin-ta*, *cin-dro*, *tornis-tro*, *en*, *per*, *ves-to*, *ven-tro*, *jam*, *las-ta*, *par-ko*, *an-kro*, *an-gla*, *lak-to*, *por*, *por-do*, *mons-tro*, *kun*, *luk-sa*.

La konsonantoj estas elparolataj mallongaj. Tiu ĉi regulo ŝajnas superflua al homoj, kiuj ne havas en sia nacia lingvo longajn konsonantojn, ekzemple la francoj kaj angloj, kaj eĉ la germanoj, sed por svedoj, italoj, hungaroj kaj aliaj tio ĉi ne estas demando sen graveco.

Tio, kion mi nun diris pri la elparolo de la Esperanta lingvo, estas nur

miaj propraj konsideroj laŭ la observoj rilate mi mem kaj aliaj esperantistoj, el kies buŝo mi aŭdis la Esperantan parolon. Ili tute ne havas la karakteron dogmodonan.

Paul Nylén.



Aforismoj kaj pripensoj.

El Markizo de Maricá.

(Brazilo)

La modesteco oras la talentojn kaj la fiereco ilin malpoluras.

La junulo diboĉa petas korektiĝi; la maljunulo malvirteca estas nerebonigebla.

La juneco malvirteca rikoltas malsanojn por la maljuneco.

La virto estas komunikebla, sed la malvirteco estas kontaktebla.

La braveco estas silenta, sed la malbraveco parolega.

La kompanio de libro indulgas indaĵe tiun de homoj.

La junulo, en la printempo de l' vivo, estimas precipe la florojn; la maljunulo, en ĝia aŭtuno, estimas sole la fruktojn.

Estas saĝa la ŝparo de paroloj, tempo kaj mono.

Timo kaj entuziasmo estas kontaktoblaj.

Estas multaj okazoj en kiuj riĉuloj kaj povuloj envias la kondiĉon de malriĉuloj kaj sensignifuloj.

La pasio de lego estas la plej senkulpa, la plej agrabla, kaj la malplej elspeza.

Bonaj ekzemploj de gepatroj estas la plejbonaj lecionoj kaj la plejbona heredo por la gefiloj.

Se la vivo estas malbonaĵo, kial ni timas mori; kaj se estas la vivo bonaĵo, kial, kun niaj malvirtecoj, ni ĝin mallongigas?

Se la vojaĝoj simple instruus la homojn, la maristoj estus la homoj plej instruataj.

La sola indaĵo de malsaĝeco estas kosti nek elspezon, nek laboron.

Unu granda eco aŭ talento indulgas malgrandajn multajn mankojn.

Oni perdas multe pro manko de inteligenteco; sed pli multe pro maldiligenteco kaj malamo al laboro.

Tradukis **A. Caetano Coutinho**,
en Sete Lagoas, Minas, Brazilujo.



Karma.

De **L. N. Tolstoj**.

(Daŭrigo de p. 46.)

Pasis multaj jaroj, kaj la konstruita de Pandu en Kolŝambo monaĥejo fariĝis loko de saĝaj monaĥoj kaj estis konata ĉie, kiel centro de civilizado por la popolo. En tiu ĉi tempo la najbara reĝo ekaŭdinte pri la beleco de la karegaj ornamigoj, faritaj de Pandu, sendis sian kasiston, por mendi kronon de pura oro, ornamigita per la plej karaj ŝtonoj el Hindujo. Kiam Pandu finis tiun ĉi laboron, li veturis en la ĉefurbon de la reĝo kaj, esperante fari tie komercajn aferojn, li prenis kun si grandan provizon da oro. La karavano, kondukanta liajn karegajn ŝtonojn, estis gardata de armigitaj homoj, sed kiam li atingis la monton, la rabistoj, kune kun Magaduto, kiu fariĝis ilia hetmano, atakis lin, disbatis la gardantojn kaj forprenis la tutan trezoron da karegaj ŝtonoj kaj oro. Pandu mem apenaŭ savis sin. Tiu ĉi malfeliĉo estis granda ekbato por la bonstato de Pandu, lia riĉeco multege malgrandiĝis. Pandu estis tre malĝoja, sed li elportis la malfeliĉon sen plendo; li pensis: "Mi

meritas tiujn ĉi perdojn por la pekoj, faritaj de mi en la antaŭa vivo; en la juneco mi estis kruela kun la popolo; kaj se mi nun rikoltas la fruktojn de miaj malbonaj aferoj, mi ne devas plendi.“ Ĉar li fariĝis multe pli bona al ĉiuj ekzistantaj, lia malfeliĉo servis nur por purigi lian koron.

Ankoraŭ pasis kelkaj jaroj, kaj okazis, ke Pantaka, juna monaĥo kaj lernanto de Narada, migrante en la montoj de Kolŝambo, falis en la manojn de la rabistoj. Ĉar li nenion havis, la hetmano bone satis lin kaj forlasis daŭrigi la migradon. En la dua tago Pantaka, irante tra la arbaro, ekaŭdis bruon de bataliĝo, kaj venante al tiu ĉi bruo, li ekvidis multajn rabistojn, kiuj furioze atakis sian hetmanon, Magaduton.

Magaduto, kiel leono ĉirkaŭita de hundoj, debatis ilin kaj mortigis multajn atakantojn. Sed liaj malamiko estis tre multaj, kaj fine li estis venkita kaj falis malvive sur la tero. Kiam la rabistoj foriris, la juna monaĥo aliris al la kuŝantaj, dezirante helpi al la vunditaj. Sed ĉiuj rabistoj estis jam malvivaj, nur ĉe la hetmano restis ankoraŭ malmulte da vivo. La monaĥo iris tuj al la rivereto, kuranta ne malproksime, alportis freŝan akvon en sia kruĉo kaj donis al la mortanta.

Magaduto malfermis la okulojn kaj, krakante per la dentoj, diris: — Kie estas la malnoblaj hundoj, kiujn mi tiel multe kondukis al la venko kaj sukceso? Sen mi ili tuj pereos, kiel ŝakaloj venenigitaj de ĉasantoj. — Ne pensu pri viaj kolegoj kaj partoprenantoj en via peka vivo, — diris Pantaka, — sed pripensu pri via animo kaj uzu en la lasta horo tiun savon, kiu prezentiga al vi. Jen al vi akvo por trinki, kaj mi ĉirkaŭligos viajn vundojn. Eble mi povas savi vian vivon.

— Tio ĉi estas senutile, — respondis Magaduto, — mi estas aljuĝita; la friponoj morte vundis min. Maldankemaj malnobluloj! ili batis min per tiuj batoj, je kiuj mi instruis ilin.

— Vi rikoltas tion, kion vi semis, — diris la monaĥo, — se vi instruus viajn kolegojn fari bonajn aferojn, vi ricevus de ili ankaŭ bonajn reagojn. Sed vi instruis ilin mortigi, kaj tial vi estas batita de iliaj manoj.

— Vi estas prava, — respondis la hetmano, — mi meritis mian parton, sed kiel ŝarĝa estas mia sorto per tio, ke mi devos rikolti la fruktojn de ĉiuj miaj malbonaj faroj, faritaj de mi en la nuna ekzistado. Montru al mi, sankta patro, kion mi povos fari, por faciligi mian vivon de tiuj pekoj, kiuj premas min kiel ŝtonego, kuŝanta sur la brusto. Pantaka diris: — Elradiku viajn pekajn dezirojn, detruu la malbonajn pasiojn kaj plenigu vian animon per boneco al ĉiuj ekzistantoj.

La hetmano respondis: — Mi faris multe da malbono kaj neniam bonon ankoraŭ faris. Kiel mi povas eliri el tiu ĉi reto da malĝojo, kiun mi elplektis de malbonaj deziroj de mia koro? Mia Karma tiros min en la inferon, mi neniam povos surpaŝi sur la vojo de saviĝo.

Kaj la monaĥo diris: — Jes, via Karma rikoltos en la estontaj korpigoj la fruktojn de tiuj semoj, kiujn vi semis en la nuna vivo. Por la faranta malbonajn aferojn ne estas savo de la sekvoj de liaj agoj. Sed ne malesperu: Ĉiu homo povas sin savi, nur kun la kondiĉo, ke li elradiku de si la eraron de personeco. Kiel ekzemplo de tio ĉi, mi rakontos al vi la historion de la granda rabisto Kandato, kiu mortis nepentante kaj denove naskiĝis en formo de diablo en la infero, kie li suferis terurajn turmentojn, por liaj malbonaj aferoj. Li estis jam multajn jarojn en la infero kaj ne povis saviĝi de sia mizera stato, kiam Budha aperis sur la tero kaj atingis brilan nomon en la

mondo. En tiu ĉi memorinda tempo la radio de lumego falis ankaŭ en la inferon, ekscitinte en ĉiuj demonoj vivon kaj esperon, kaj la rabisto ekkriis: "Ho, bona Budho, kompatu min! mi terure suferas; kvankam mi faris malbonon, mi deziras nun iri sur la vojo de vereco. Sed mi ne povas eliri el la malĝoja reto; helpu al mi, Dio, kompatu min!" La reguloj de Karma estas tiaj, ke malbonaj aferoj kondukas al pereigo.

Kiam Budho ekaŭdis la peton de la suferanta demono en la infero, li sendis al li araneon sur araneaĵo, kaj la araneo diris al li: "Tenu sin en la araneaĵo kaj elrampu sur ĝi el la infero." Kiam la araneo malaperis, Kandato ekkaptis la araneaĵon kaj komencis rampi sur ĝi. La araneaĵo estis tiel forta, ke ĝi ne disŝiriĝis, kaj li leviĝis iom post iom pli alte. Subite li ek-sentis, ke la fadeno komencis tremi kaj ŝanceliĝi, ĉar post li sur la araneaĵo rampis ankaŭ aliaj suferantoj. Kandato ektimis: li vidis la maldikecon de la araneaĵo kaj, ke ĝi distiriĝas de la pligrandiĝinta ŝarĝo. Sed la araneaĵo tenis lin ankoraŭ forte. Kandato ekrigardis malsupren kaj ekvidis, ke post li rampis sennombra amaso da inferaj loĝantoj. "Kiel povos elteni tia maldika fadeno la ŝarĝon de ĉiuj tiuj ĉi homoj" — ekpensis li kaj, ektimiĝinte, li laŭte ekkriis: "Delasu la araneaĵon, ĝi estas *mia!*" La araneaĵo subite disŝiriĝis, kaj Kandato falis ree en la inferon. La eraro de personeco ekzistis ankoraŭ ĉe Kandato. Li ne sciis la mirindan forton de la vera celiĝo supren, por surpaŝi sur la vojo de vereco. Tiu ĉi celo estas maldika kiel araneaĵo, sed ĝi levas milionojn da homoj; kaj ju pli multe da homoj rampos sur ĝi, des pli facile estos al ĉiu el ili. Sed kiam en la koro de la homo naskiĝas penso, he la araneaĵo estas *mia*, ke la bono de vereco apartenas sole al *mi* mem kaj ke neniu dividu ĝin kun *mi*, la fadeno disŝiriĝas kaj oni falas ree en la antaŭa stato de aparta personeco; la aparteco estas malbeno, kaj unueco estas beno. Kio estas la infero? La infero estas nenio alia, ol sinamo, kaj Nirvana estas komuna vivo... — Lasu do min kaptiĝi en la araneaĵo, — diris la hetmano, kiam Pantaka finis sian rakonton, — kaj mi eliros el la infero. Magaduto silentis kelkajn minutojn, pensante pri io, poste li daŭrigis: — "Aŭskultu min, mi konfesos al vi: Mi estis servanto ĉe Pandu, juvelisto el Kolŝambo. Sed kiam li senrajte turmentigis min, mi forkuris de li kaj fariĝis hetmano de rabistoj. Antaŭ ne longe mi eksciis de miaj esploristoj, ke li traveturadas tra la montoj, kaj mi forrabis de li grandan parton de lia havaĵo. Iru al li kaj diru, ke mi pardonis al li por la ofendo, kiun li faris al mi senrajte, kaj petu ankaŭ pardonon de li por tio, ke mi rabis lin. Kiam mi estis ĉe li, lia koro estis kruela kiel ŝtono kaj mi lernis de li sinami. Mi aŭdis ke li estas nun bonanima, kaj li estas modelo de boneco kaj honesteco. Mi ne volas resti al li ŝulda; tial diru al li, ke mi konservis lian oran kronon, kiun li faris por la reĝo, ankaŭ ĉiujn liajn trezorojn. Mi kaŝis ilin en subtero. Nur du rabistoj sciis pri tiu ĉi loko kaj nun ili ambaŭ estas malvivaj. Li prenu kun si armigitajn homojn, venu al tiu ĉi loko kaj reprenu siajn proprajojn, kiujn mi forrabis de li." Post tio ĉi Magaduto diris kie estis la subtero, kaj mortis sur la manoj de Pantaka. Kiam la juna monaĥo Pantaka revenis en Kolŝambon, li iris al la juvelisto kaj rakontis al li pri ĉio, kio okazis kun li en la arbaro. Pandu iris kune kun armigitaj homoj al la subtero kaj reprenis ĉiujn trezorojn, kiujn la hetmano kaŝis tie. Ili kun estimo enterigis la hetmanon kune kun liaj mortigitaj kolegoj, kaj Pantaka, pripensante pri la vortoj de Budho, diris la sekvanton: "La personeco faras malbonon, la persono do suferas de ĝi." "Kiam la persono detenas sin de mal-

bono, tiam la personeco puriĝas.“ “La pureco kaj malpureco apartenas al persono: neniu povas purigi alian.“ “Homo devas mem peni fari bonon; Budhoj estas nur predikoj.“ “Nia Karma ne estas produktaĵo de Ŝivara, Bramo, Indro aŭ de ia alia el la diaj, — nia Karma estas sekvo de niaj agoj.“ “Nia faremeco estas interno, kiu portas nin, ĝi estas heredo, kiu apartenas al ni, ĝi estas malbeno de niaj malbonaj aferoj kaj beno de nia vereco. Nia faremeco estas sola rimedo por nin savi.“

* * *

Pandu revenigis en Kolŝambon ĉiujn siajn trezorojn, kaj modere uzante sian tiel neatendite ricevitan riĉecon, li trankvile kaj feliĉe travivis la restan vivon, kaj kiam li mortis jam en la profunda maljuneco, kaj ĉiuj liaj gefiloj kolektiĝis ĉirkaŭ li, li diris:

— Bonaj infanoj! ne kulpigu aliajn en viaj malprosperoj. Serĉu la kaŭzojn de viaj mizeroj en vi mem. Kaj se vi ne estas blindigitaj per vanteco, vi trovos ĝin, kaj trovante ĝin, vi povos saviĝi de la malbono. La kuracilo de la mizeroj estas en vi mem. Via spirita rigardo ne estu kovrigita per la vualo de Maja. Memoru la sekvantajn vortojn, kiuj estis la talismano de mia vivo: “Tiu, kiu faras malbonon al aliaj, faras malbonon al si mem.“

“Tiu, kiu helpas al alia, helpas al si mem.“

“Malaperu la eraro de personeco — kaj vi surpaŝos sur la vera vojo.“

Tradukis **B. Spektor**.



Informejo de esperantistoj.

Deziras korespondadi kun esperantistoj s-ro *C. A. Neudaĉin* en Blahovesĉensk na Amure (Amurskaja oblast), Kaznaĉejstvo. Sibirujo Orienta. Rusujo.

S-ro *Rudolf Sperl*, pens. k. k. Beamter (pensiata imperia-reĝa oficisto), en *Leoben*, W. 20, Steiermark (Stirujo), Aŭstrujo, petas, ke ni sciigu la estimatajn esperantistojn, ke li ĉiam respondas esperantajn korespondojn al li. Tial, se iu skribinta al li ne ricevis respondon, tio dependas de eksteraj cirkonstancoj ekz. perdo en la poŝto aŭ simile. Li petas ankaŭ siajn korespondantojn, kiuj ne ricevis liajn respondojn, ke ili sciigu per tiu ĉi gazeto sian precizan adreson, kaj li intencas ĉe bezono komunikiĝi kun ili per la gazeto.

ANONCOJ.

Esperantistoj rusaj!

Subskribita, esperantisto finlanda, kin en la komenco de Novembro intencas vojaĝi al Rusujo kaj resti tie 4 à 5 monatojn por lerni lingvon rusan, petas bonajn konsilojn de rusaj esperantistoj. Plej volonte mi volus loĝi en *Sud-Rusujo*. Ĉu ĝi estus tre multekosta loĝi en Odessa aŭ ĝia najbareco aŭ en Jalto? Ĉu ia esperantisto volus sciigi min, kie mi tie povus trovi loĝejon ne multekostan?

Volu skribi al S-ro **Theodor Sunell**.

Kannus. Finlando.

Signetoj esperantistaj (kun pinglo aŭ kun ringeto) riceveblaj de juvelisto **H. Štalberg**, Rusujo, Estl. gub., *Vezenberg*, Peterb. str. 97.

Prezo de la arĝenta: rubl. 1,50, de la bronza: rubl. 0,50. Transsendo aparte, en Rusujo de 14 kop. en alilandojn de 20 kop. komencante. Oni povas pagi ankaŭ kun mono alilanda, sed se poveble mi petas elekti monon anglan, francan, germanan, svedan aŭ unuig. ŝtat. amer.